

N-ro 3/2007
19a jaro (2a periodo)



Velkommen

Det er ikke alltid like lett å vite hva som er bannskap og hva som ikke er det. Bare ved å endre rekkefølgen på et par ord kan ting fort gå galt, noe som illustrerer akkurat hvor viktig det er å være forsiktig når man befinner seg i et annet land med et annet språk. Flere ganger har det oppstått situasjoner etter at jeg flyttet til England der folk har bannet uten at jeg engang har fått det med meg. Det er ikke bare ordene, men også kulturen der du er som bestemmer om du banner eller ikke.

Aleksander



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktas: Aleksander Helgaker

Ranunkolo!

Laŭ sia propra konvinko oni povas bedaŭri aŭ laŭdi la esprimkapablojn de Esperanto. Same kiel multaj aliaj homoj, ankaŭ mi dum jaroj observis abundan Esperantan sakradon dum Universalaj Kongresoj, en literaturo kaj aliloke.

Sed kio estas sakrado? «Li parolis diable» ne estas sakrado. «Diable! Li parolis!» certe estas sakrado. La vorto «diable» en si mem ne estas sakraĵo, sed la sakra intenco de ĝia uzo igas ĝin sakra. Kaj intencoj estas tre sendependaj de la lingvo kiun oni uzas por manifestacii la intencojn. Oni ne povas malpermesi la radikon *diabl-* sen samtempe cenzuri ekz. la Biblion.

Same, kiam Henrik Ibsen en 1879 lasis Nora diri «død og pine» (morto kaj turmento), tio estis severa sakraĵo. Multajn jarojn poste Odd Tangerud tradukis la esprimon Esperanten per «la diablo prenul!». Neniu el la vortoj estas en si mem sakraĵoj, sed la uzo difinas la sakran funkcion.

Sakrado ankaŭ havas alian aspekton: Se oni provas eviti aŭ malpermesi specifajn vortojn, tiuj vortoj fariĝas tabuaj. Kaj tabuaj vortoj aŭtomate fariĝas bonaj sakraĵoj, ĉar la fenomeno sakrado estas lingva rompo de tabuoj aŭ deco.

Aliflanke, se oni tro alkutimiĝas al iu sakraĵo, la vortoj sentabuiĝas, la sakra funkcio paliĝas, kaj aliaj vortoj alfluiĝas en la sakran rolon. Nuntempe «død og pine» estas relative malforta sakraĵo en la norvega.

Do ĉu oni volas aŭ ne volas, sakraĵoj ekzistas. Unu el miaj studentoj, Arnhild Lindbach, rakontis pri norvega lernejo, kie la plej religiemaj lernantoj decidis diri «smørblomst» (ranunkolo) kiam ili koleriĝis. La rezulto estis, ke la nomo de tiu floro fakte fariĝis sakraĵo, kaj fine la koncernaj lernantoj pro sia propra indigniĝo decidis ne plu uzi la vorton.

Alivorte: La sakra funkcio igis la vorton fia, kaj tiel la lingvo mem kompensis por la ne-uzo de aliaj sakraĵoj.

Alia ekzemplo povas esti ke nuntempe en la norvega oni apenaŭ povas babilu tro multe pri la besto «mus» (muso) sen rideti, ĉar «mus» ankaŭ estas uzata iom maldece pri la vagino, kompanse pro la neuzo de la eĉ pli maldeca «fitte» (piĉo), kio efektive origine signifis simple 'grasajo'.

Ne estas strange ke multaj homoj ne ŝatas okupiĝon pri tabuoj kaj maldecaĵoj. Ekzemple venis protestoj de Norvegio kaj eksterlando kontraŭ la sakraj-konkurso (ne sakrad-konkurso, sed sakraj-konkurso!) de NJE. Kelkaj uzis personpriskribajn vortojn kun aŭ sen la afiksoj *fi-* kaj *-aĉ-*, kaj en siaj kunteksto la vortoj fariĝis same ofendaj kiel sakraĵoj, ekz. kiam iu insistis ke la estraranoj de NJE estas sencerbuloj.

Tio estas unu el la malbenoj (aŭ benoj?)



Imagu ke tiel bela floro povas esti uzata kiel sakraĵo

de ĉiuj vivantaj lingvoj: Ili adaptiĝas al siaj parolantoj, eĉ kiam la parolantoj tion ne volas.

Krom la Zamenhofaj afiksoj *fi-* kaj *-aĉ-* ne ekzistas multe en Esperanto kio estas ofenda sendepende de kulturo aŭ kunteksto. Plej ofte la ofenda funkcio troviĝas nur en la intenco uzi la lingvon ofende. Estas pensiga afero, do, ke la solaj eksplicite senhonorigaj elementoj de Esperanta gramatiko estis proponitaj de Zamenhof mem.

Jardar Eggesbø Abrahamsen

Lernu! får seg nettbutikk

Internettsiden *Lernu!*, som er et internettbasert kurs for å lære esperanto, har nå åpnet sin egen nettbutikk. I nettbutikken kan man blant annet kjøpe gensere, t-skjorter og en rekke andre varer med *Lernu!*-merke på. Man kan blant annet skaffe seg en grønn t-skjorte med *Lernu!*-merke på for \$14,99. For mer info: www.cafepress.com/lernu.



Ny utgivelse fra Vinilkosmo

Vinilkosmo har nylig begynt å selge et nytt produkt som skal lære folk å bruke esperanto. Denne gang er det et DVD-program som man bruker på datamaskinen. Det går under navnet *Esperanto Elektronike* og koster 7,95 euro. DVD-en er produsert av E@l som har stått bak en del andre esperanto prosjekter, blant annet *Lernu!*.

DVD-en ser ut til å være det mest komplette dataprogrammet så langt, og inneholder en rekke metoder for å lære esperanto. På DVD-en finner man blant annet lærebøker fra *lernu!*, tekster på esperanto (både originale tekster og oversatte tekster), musikk, spill, osv.

Mer informasjon om DVD-en finnes på <http://vikio.ikso.net/Projektoj/ElektronikaEsperantio/DVD> > og selve DVD-en kan enkelt kjøpes fra www.vinilkosmo.com/.



NJE – Jarraporto 2006

Ĉi tie troviĝas eltiraĵoj el la jarraporto de NJE. La membroj de NJE ricevas la tutan jarraporton per poŝto. Ĝi ankaŭ troviĝas ĉe la interreta versio de *Inter ni dirite*: <<http://www.esperanto.no/nje/ind/ind2007-03.php#jarraporto>>

ADMINISTRADO

La estraro konsistis el
Signe Christophersen, prezidanto
Kristoffer R. Haug, vic-prezidanto
(forpermeso ekde oktobro)
Kai S. Salvesen, sekretario
Leif Arne Storset, kasisto
Aleksander Helgaker, estrarano
Judith P. Abrahamsen, anstataŭanto

Revizoro: Arne Olav Mjøen
Vic-revizoro: Kristina Kvamme Nygård.

Pressetalsmann: Leif Arne Storset.

Elekta komitato: La estraro elektis Anders Berg kaj Kai Salvesen (kiu eliros el la estraro) kiel elekta komitato.

* Post la akceptiĝo kaj elsendado de la jarraporto, la estraro lernis ke NJE havis 29 membroj en 2006.

Okazis tri estrarkunvenoj en 2006 – ĉiuj estis telefonaj. Granda parto de nia laboro okazis retpoŝte.

La 31an de decembro 2006 NJE havis 28* membrojn (2005: 28).

FINANCOJ

La jarkalkulo de 2006 montras (mal)profiton de 5 751,42 kr.
Saldo: 27 978,59 kr.

KONKLUDO

2006 estis bona jaro por NJE. Aktivis ne nur la estraro, sed ankaŭ la membroj. En *nje-listo* okazis multaj diskutoj – pri plej diversaj temoj. Kaj al nia kunveno en marto kaj al la fotado en novembro venis pluraj pli-malpli novaj membroj. La estraro suk-

PONDUS

© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com



cesis al ĉiu numero de *Norvega Esperantisto* kontribui per ampleksaj junularaj paĝoj – kaj ni sukcesis aranĝi almenaŭ unu tutlandan kunvenon. Parte dank' al la art-projekto de Bård Ask NJE ankaŭ sukcesis doni pozitivan bildon pri si mem en la amaskomunikoloj.

Venonta IND

Redaktør for neste nummer av *Inter Ni Dirite* er ikke bestemt ennå, men bidrag bør være oss i hende innen 24. august.

— FINO DE *INTER NI DIRITE* —